

# Nederlanda Katoliko

Maandblad van de Nederlandse Bond van Katholieke Esperantisten.  
„NEDERLANDA KATOLIKO”, gevestigd te 's-Hertogenbosch

Opgericht 29 Augustus 1909  
Bisschoppelijk en Koninklijk goedgekeurd

Redactie: A. F. Leideritz Jr., Vechtstraat 5, Amsterdam-Z.  
Vaste medewerkers: J. S. Jansen, Amsterdam en Dr W. J. A. Manders, Venlo

---

## REZOLUCIO,

unuanime akceptita okaze de la jarkunveno de „Nederlanda Katoliko” je la 24-a de aprilo 1949 en Eindhoven.

La kunvenantaro komisiis al la ĉefestraro:

1. esplori en mallonga tempo (2 monatoj) ĉu — kaj eventuale ĝis kia grado — kunlaboro kun „La Estonto Estas Nia” kaj „Flandra Ligo Esperantista” rilate la eldonon de komuna organo estas efektivebla;
2. formuli, rezulte de la esploro sub 1, konkretan proponon, kiu estu publikigata en „Nederlanda Katoliko” kaj pri kiu la membroj voĉdonu pere de referendumo;
3. esplori ĉu — kaj eventuale ĝis kia grado — tiu ĉi kunlaboro estas realigebla ankaŭ por aliaj aferoj.

## KLARE TAALI

## III.

En la pasinta monato ni legis kaj aŭdis sensaciajn kaj nemiskompreneblajn vortojn. La artikolo „Klare taal” (I) de nia prezidanto multajn surprizis. Verŝajne kelkaj detaloj ne trovis ĉies aprobon, sed pri la ĝenerala tendenco ne aŭdiĝis kritiko, kvankam por tio la jarkunveno prezentis bonan okazon.

„Klare taal” (II) ni aŭdis en Eindhoven, kie s-ro Leideritz per pasia improvizaĵo enkondukis sian jarraporton kaj senindulge kaj malkaŝe kritikis la nunan situacion. Ĉar neniu el la ĉeestantoj eligis vorton de protesto kontraŭ la kerno de tiu orelstreĉe aŭskultita parolo kaj ĉar oni unuanime akceptis la rezolucion proponitan de s-ro Leideritz, la konkludo sin altrudas ke la granda plimulto de Nederlanda Katoliko komprenas la neceson serioze revizii nian ĝisnunan koncepton pri celo kaj metodoj de Nederlanda Katoliko.

Ankaŭ ĉi tiu artikolo volas kontribui al la akiro de plena klareco pri la vojo irota. Volonte mi ricevos kritikojn, kaj sendube la redaktoro same volonte ilin publikigos, ĉar komuna diskutado pri principaj problemoj certe estas dezirinda kaj utila.

Esplorante la bazon de nia katolika movado ni devas eliri ne de la katolikismo, sed de esperanto. Ni — aŭ almenaŭ la granda plimulto el ni — ne fariĝis esperantistoj ĉar ni estas katolikoj, sed ĉar la ideo pri universala helplingvo altiras nin. **Esperanto estas nura lingvo**, ne pli katolika ol la nacia lingvo, ne pli religia ol la angla, latina aŭ rusa lingvo. Ne pro religiaj motivoj oni kutimas lerni lingvojn: la gimnazianoj (ankaŭ la katolikaj) lernas la klasikajn lingvojn por profundiĝi en paganan literaturon (la gimnazian A-diplomon oni akiras post sukcesa traduko el ses aŭtoroj, kiuj senescepte estas paganoj). Ankaŭ la „modernajn” lingvojn oni lernas (kaj instruas) ne demandante sin ĉu la francoj, angloj aŭ germanoj estas (bonaj) katolikoj, kaj studante tiujn lingvojn la katolikoj ne strebas al iu speciale katolika celo. Ĉiuj lingvoj, ankaŭ esperanto, estas absolute neŭtralaj komunikiloj, same neŭtralaj kiel tiu alia pli teĥnika komunikilo kiu nomiĝas telefono.

Esperanto ankoraŭ ne estas universala, kaj ĝi neniam univer-

saliĝos se la esperantistoj ne propagandos ĝin. Tial estiĝis naciaj asocioj kies sola aŭ ĉefa celo estas: disvastigi la lernadon kaj aplikadon de esperanto. En nia lando ekzistas kvar divers-tendencaj naciaj unuiĝoj kun entute 5000 membroj. Ke el la sennombraj nederlandanoj kiuj jam lernis esperanton nur kvin mil sentas la bezonon organizi sin estas fakto bedaŭrinda, sed ni ne rajtas severe kritiki la izolulojn. Lernante esperanton oni ne prenas sur sin moralajn devojn kaj ne estas riproĉinde se oni poste ne volas uzi aŭ propagandi la lingvon. Kritikindaj estas nur tiuj kiuj per sia aliĝo al ia organizo morale devigas sin al aktiva kunlaboro, sed tamen restas indiferentaj. Ankaŭ la katolikan esperantiston ni ne rajtas mallaŭdi se li restas ekster la movado, ĉar nek lia katolikismo nek lia esperantismo devigas lin aliĝi al Nederlanda Katoliko. Sed por ke ni atingu la efektivigon de nia planlingva idealo nepre necesas firmaj organizoj kun impona membraro kaj sufiĉaj financaj rimedoj. Tial ni nepre devas streĉi niajn fortojn por kreskigi "Nederlanda Katoliko", sed krome ni devas pli klare difini nian celon kaj elekti la rimedojn kiuj plej konformas.

Laŭ nia statuto Nederlanda Katoliko celas:

1-e progresigi la aplikon de esperanto inter la nederlandaj katolikoj;

2-e flegi la internaciajn katolikajn interesojn per esperanto.

**La unua punkto estas tro strikta.** Ni estas esperantistoj kaj deziras la ĝeneralan enkondukon de esperanto. Progresigo de nia lingvo inter katolikoj estas ebla nur kiam ankaŭ aliaj rondoj aplikas esperanton. Ke ne eblas limigi la „progresigon” al katolikaj rondoj, tion ni fakte jam de longe manifestis. Malgraŭ nia statuto Nederlanda Katoliko ja kunlaboras en la ekzamena komitato, en N.C.K.E., en la grava organizo „Esperanto bij het onderwijs”, institutoj kiuj ne celas propagandi esperanton en katolikaj rondoj, sed havas ĝeneralan karakteron. Ni ne mistifiku nin mem. **Nederlanda Katoliko** havas ekzistorajton nur tiam, se ĝi rekte laboras por la ĝenerala disvastiĝo de esperanto (kiel ĝi fakte faras). Nia movado devas esti katolika ne nur pro la episkopara deziro, sed ankaŭ ĉar katolika unuiĝo povas propagandi en rondoj kien la neŭtrala movado ne povas penetri (cetere tiu 40-jara propagando ĉe katolikaj instancoj en Nederlando ĝis nun ne rikoltigis grandiozajn rezultojn... ). Kon-



kludo: Nederlanda Katoliko devas celi (kaj fakte jam celas, kvankam ne sufiĉe konscie) atingi la ĝeneralan enkondukon de esperanto. Ĝia speciala sed ne ekskluziva tereno de agado estas la katolikaj rondoj.

**La dua punkto estas ne nur superflua, sed eĉ falsa.** Sendube esperanto povas fariĝi valora rimedo por la disvastigo de niaj katolikaj idealoj. Sendube meritas laŭdon kaj aprobon tiuj, kiuj uzadas nian lingvon por pure religiaj celoj. Sendube estas utile kaj bone ke ekzistas I.K.U.E. kaj I.K.I. por apliki esperanton en la servo de nia eklezio. Sed Nederlanda Katoliko limigu sin per **propagandado** por I.K.U.E. kaj I.K.I., **rezervante al si kiel propran kaj solan taskon la disvastigon de esperanto.** Multaj katolikoj (laŭ mia konvinko la plimulto) lernas esperanton ne por servi religiajn interesojn. Se ili volas organizi sin sen malobeo al la episkopara deziro ili devas aliĝi al Nederlanda Katoliko. Ĉu ili estas malbonaj katolikoj, se ili lernis kaj aplikas esperanton nur por amuziĝi, por korespondi aŭ vojaĝi, por kolekti poŝtmarkojn? Ĉu pro la nura fakto ke ni estas katolikaj esperantistoj kaj volas per aliĝo al nacia organizo helpi la disvastiĝon de esperanto, ni estas devigataj akcepti statuton kiu altrudas al ni la celon flegi la internaciajn katolikajn interesojn? Ankaŭ la latina lingvo estas internacia, precipe en nia eklezio, kaj tamen laŭ mia scio nek la eklezio nek alia instanco iam klopodis mobilizi la laikajn katolikajn latinulojn. Ankaŭ la angla, franca kaj germana lingvoj estas internaciaj, sed tamen oni povas lerni tiujn lingvojn ne riskante la ŝancon ke la eklezio aŭ ia speciala unuiĝo invitos nin utiligi nian scion „por flegi la internaciajn katolikajn interesojn”. Nederlanda Katoliko ne nur invitas nin (kontraŭ tio neniu protestus), sed ĝi oficialigas tiun flegadon per sia statuto. Mi ne scias ĉu Nederlanda Katoliko en la daŭro de 40 jaroj ofte servis la internaciajn katolikajn rilatojn, mi ankaŭ ne scias ĉu iam la eklezio petis la helpon de Nederlanda Katoliko, sed fakto estas ke nur internacia organizo de libervoluloj (I.K.U.E.) rajtas **postuli** ke ĝiaj membroj apliku esperanton por pure religiaj celoj.

Por ke esperanto povu fariĝi vere ideala rimedo en la servo de nia internacia eklezio antaŭ ĉio necesas ke ĝi multe pli disvastiĝu ol nun. Ĉiu individua membro de Nederlanda Katoliko apliku la lingvon laŭ sia propra plaĉo: se li kredas ke li povas per ĝi utili al la katolikismo, li agu kiel lia propra

konvinko al li diktas; se li preferas uzi ĝin por turismaj celoj aŭ por nura distro neniu kritiku lin, kondiĉe ke li ne misuzu ĝin por celoj kontraŭaj al niaj katolikaj principoj. Sed Nederlanda Katoliko kiel kolektivo dediĉu sin ekskluzive al esperanto kaj ĝia disvastiĝo, klopodante atingi kaj interesigi speciale la rondojn katolikajn.

W. MANDERS

## ASOCIA RAPORTO PRI „NEDERLANDA KATOLIKO” DE LA 1-a DE MARTO 1948 ĜIS LA 15-a DE APRILO 1949

### Estraro

L. G. C. de Jong, prezidanto; A. F. Leideritz, sekretario; H. F. Roobeek, kasisto; M. T. Aerds, vicprezidanto; K. J. Ver-nooy, vicsekretario; f-ino T. Durenkamp, libroservo; dro W. J. A. Manders, membro.

Paroĥestro Hub. J. A. M. Eras, religia konsilanto.

La estraro kunvenis je la 19-a de junio 1948, la 30-a de oktobro 1948, la 5-a de februaro 1949 kaj la 2-a de aprilo 1949.

La religia konsilanto neniam povis ĉeesti.

Ĉe la komenco de novembro la sekretario vizitis — kun frato Wigbertus van Zon — la religian konsilanton por preparoli kun li la planon rilate la eventualan eldonon de komuna organo por L.E.E.N., Fl.L.E. kaj N.K. La preparoladoj ne havis pozitivan rezulton.

Ĉe la fino de novembro la sekretario sciigis al la prezidanto, ke li de la 1-a de januaro 1949 deziras ekziĝi kiel ĉefestrarano. Post interkonsiliĝo kun la ĉefestraro li konsentis funkcii ĝis la jarkunveno.

### Reprezentado

N.C.K.E.: L. G. C. de Jong kaj H. F. Roobeek.

Ekzamena Komitato: P. Heilker, L. G. C. de Jong kaj frato Wigbertus van Zon.

Esperanto ĉe la instruado: L. G. C. de Jong.

Raportoj pri la agadoj de la ĉi-supre nomitaj instancoj jam aperis aŭ tre baldaŭ aperos en la organo.

### Membraro (je la 1-a de januaro 1949)

Alkmaar (19); Amsterdam (41); Apeldoorn (7); Bergen op

Zoom (7); Dordrecht (9); Eindhoven (51); Gouda (6); 's-Gravenhage (37); Haarlem (17); 's-Hertogenbosch (14); Hoorn (6); Nymegen (11); Rotterdam (25); Utrecht (48); Venlo (7); Zaanstreek (11).

Ĝeneralaj membroj (134). Entute: 450.

### Jarkunveno

Je la 4-a de aprilo 1948 okazis en 's-Gravenhage la jarkunveno. 13 sekcioj sendis delegitojn. Frato van Zon kaj s-ino Burgler—Jeszó pledis por la interesoj de la individuaj membroj. Dum la posttagmeza kunsido parolis d-ro W. J. A. Manders pri: La esenco de esperanto; konsideroj kaj konkludoj.

La kunvenintaro unuanime akceptis rezolucion, destinitan por la registaro kaj parlamento, rilate la fakultativan enkondukon de esperanto en la lernejojn.

### Organo

Laŭ decido de la jarkunveno la organo aperos estonte alternmonate. Tio okazis por aprilo—majo kaj junio—julio (po 6 paĝoj). Por iom kompensi la perdon de „Espero Katolika” ĝi aperis monate en septembro, oktobro kaj novembro (po 6 paĝoj).

Pro la menciita ekŝiĝo de la sekretario, la regula eldono stagnis ĝis la fino de februaro kiam ĝi (por januaro—februaro) reaperis. Poste denove monate en marto kaj aprilo.

Kiel redaktoro funkciis s-ro A. F. Leideritz. De post septembro s-ro J. S. Jansen kaj d-ro W. J. A. Manders fariĝis kunlaborantoj en la organo.

### Propagando

En septembro aperis speciala faldfolio „Esperanto iets voor U?”. La tekston verkis f-ino Truus Durenkamp. Eldonkvanto: 10.000 ekz. Ĉi tiu broŝuro povis aperi dank' al donaco de frato Wigbertus van Zon. Ĉiu sekcio ricevis kvanton da ili; malgraŭ la anonco en la organo, ke la broŝuro estas ankaŭ havebla por la individuaj membroj, neniu el ĉi tiu kategorio reagis.

### Libroservo

Laŭ sciigoj de f-ino Durenkamp envenis 345 mendoj (inter kiuj 214 lernolibroj kaj 110 ekz. de la Esperanta krestomatia). Ĝenerale la mendintoj pagis sufiĉe baldaŭ; nur kelkaj el ili

Ĉiam prokrastis la kvitigon de sia ŝuldo, kio kaŭzis multan nenecesan laboron.

### **Serva organizo**

En sia kunveno je la 19-a de junio la ĉefestraro decidis prokrasti la efektivigon de ĉi tiu plano ĝis pli bonaj cirkonstancoj en la internacia situacio de nia movado.

### **Helpo al Aŭstrujo**

En la sama kunveno oni unuanime opiniis, ke tia agado ne plu estas tiom urĝa kiom antaŭ kelke da jaroj. Pro tio la estraro decidis rezigni pri la plano.

A. F. LEIDERITZ

## **MEDEWERKERS GEVRAAGD**

Voor onze gecombineerde mondelinge en schriftelijke cursus hebben we nog enige correctors nodig. Hun taak omvat behalve het corrigeren van de gemaakte oefeningen, tevens het geven van mondelinge toelichting bij de lessen.

Speciaal in de provincies Zeeland, Drente, Gelderland (noordelijk gedeelte), Overijssel en Utrecht, alsmede in de plaatsen Haarlem, Leiden, Rotterdam, Breda en 's-Hertogenbosch bestaat dringend behoefte aan leraren.

Brieven aan de administrateur A. W. Withoos, Venkelstraat 15 te Eindhoven.

## **TELEFOONKAARTEN**

De telefoonkaarten, die wij van plan zijn te laten drukken, hebben we nog niet kunnen bestellen. Tot nu toe is namelijk het vereiste aantal (500) niet binnen.

Leden, die propaganda wensen te maken voor esperanto en daarvoor een goed middel wensen te hebben, bestellen zeker onze telefoonkaart.

Bestel er ook voor uw vrienden, die thuis telefoon hebben. In uw clublokaal, in het verenigingsgebouw, in café's, hotels etc., kortom overal waar een telefoontoestel is behoort onze kaart te hangen.

Stuur op nummer 308475 van A. W. Withoos (Venkelstraat 15 te Eindhoven) zoveel dubbeltjes als u telefoonkaarten nodig hebt.

Heeft u nog sluitzegels en propagandakaarten? Niet? Schrijf even en u krijgt ze thuis gestuurd.

## Jarkunveno de „Nederlanda Katoliko” en Eindhoven je la 24a de aprilo 1949

Post la malfermo la prezidanto diris ke li iom pesimisme estis antaŭ ĉi tiu kunveno, sed nun pro la multaj ĉeestantoj kaj la bone sukcesinta festvespero fariĝis pli optimisma. Dankis la sekcion Eindhoven pro la vespero kaj gratulis ĝin okaze de ĝia arĝenta jubileo. Li konstatis kun ĝojo ke Philips elektis esperanton por prov-elsendado televizia, pruvo ke esperanto plivastiĝas.

La prezidanto speciale bonvenigis s-ron Baas, prezidanton de L.E.E.N. kaj de la oficejo „Esperanto ĉe la instruado”. S-ro Baas petis la parolon kaj transdiris la bondezirojn de la geanoj. La interŝanĝo de afablaj vortoj estas ne nura ĝentileco. Niaj asocioj estas intime ligitaj en N.C.K.E. kaj „Esperanto ĉe la instruado”. Membroj ni estas de unu korpo. Kiam unu membro malsaniĝas, tiam la tuta korpo estas malsana. S-ro Baas havis la impreson ke Nederlanda Katoliko ne bonfartas, sed ne nur ĝi, ankaŭ L.E.E.N. suferas pro sama manko. Kaŭze de tio oni akceptis deziresprimon en la kongreso de L.E.E.N. por kunfandiĝo de la ekzistantaj esperanto-organizaĵoj. Li esperis ke la jarkunveno havu bonan rezultaton kaj ke la necesaj rimedoj konduku al plifortigo de la katolika movado.

Envenis salutletero de F.L.E. kun gratulo al „Suda kruco”; same de K.U.N.E.

Nun improvizis la ekziganta sekretario s-ro Leideritz. Li diris i.a.: „Antaŭ ol doni resumon pri la pasinta jaro mi volonte kaptas la okazon por paroli personan vorton. Verŝajne ĉi tio estos iom revolucia, sed la nura kialo estas mia konvinko ke ni devas eniri alian direkton. Tute ne ekzistas malsamaj opinioj en la ĉefestraro, kontraŭe estas kaj regas plena harmonio kaj kompreno. Por doni klaran impreson pri la situacio mi rigardos diversajn faktojn, sed estu certa ke mi tion ne faras por ofendi iun ajn.

En septembro ni festos nian 40-jaran ekzistjubileon. Ĉi rilate estas bone konsideri la celon de nia ligo ĉe la starigo (laŭ la devizo de Peltier: katolikismo per esperanto, esperanto per katolikismoj) kaj la praktikan rezulton de nun. Kion ni konstatas? Kelkaj papoj aprobis nian movadon; kardinalo kaj aliaj ekleziaj altranguloj parolis instigajn vortojn pri ĝi. Kompren-



eble ni uzis tion por nia propagando. Profiton tio ĉi ne havis, ĉar la sacerdoto katolika ne staras efektive malantaŭ ni. Pro tio la celo kaj principo de antaŭ 40 jaroj nun ne havas plu valoron. La flegado de la katolikaj interesoj nur povos efektiviĝi se ni havas ampleksan nombron da anoj, se miloj kaj miloj estas en niaj vicoj kaj se unualoke la katolika sacerdoto kunlaboras kaj subtenas nian streĉadon. Alie ĝi fariĝos utopio.

Nederlanda Katoliko estas sekcio de I.K.U.E. Internacie ni estas ankaŭ malfortaj pro la fera kurteno, devizoj, k.t.p. Nia laboro post la liberiĝo havas etan rezultaton. Konata proverbo nederlanda: aliaj cirkonstancoj, aliaj rimedoj! Tiel ankaŭ en nia movado. Kun kelkcentoj da anoj ni neniam havos kontentigan rezultaton. Sed kien kaj kiel?

Post longa pripensado la ĉefestraro decidis aliajn vojojn. Ankaŭ L.E.E.N. kaj Flandra Ligo Esperantista faris tion. Ili klopodis trovi bazon por efektiviĝo kaj de la unua de januaro pasinta ili eldonas komunan gazeton, tute ne oferante sian memstarecon. Ĉi tiu labormaniero havas multajn avantaĝojn praktikajn. La ĉefestraro de Nederlanda Katoliko unuanime opiniis ke ankaŭ ĝi sekvu tiun vojon. Kiel reprezentanto de la estraro mi priparolis la gravan aferon kun frato W. van Zon kaj nia religia konsilanto, kiu havis por tiu serioza temo nur 10—15 minutojn. Ni ne atingis rezultaton.

I.K.U.E. tute ne floras. Dank' al la iniciato de kelkaj samideanoj, Espero Katoliko dum kelka tempo povis aperi. Nederlando en tio havas gravan rolon. En Drakenburg okazis internacia kongreso de tre modesta karaktero. La kongreso en Dijon ne efektiviĝis. Por atingi pli bonan rezultaton oni planis kunsidon en la kadro de U.E.A. Parto de I.K.U.E. progresiva, parto konservativa!

Venis nun la tempo por forlasi la konservativajn principojn. Pli da kunlaboro estas necesa. Kunlaborante ni povos pli multe atingi.

En la budĝeto-1949 vi legos elspezon de 1500 gld. por nia Nederlanda Katoliko-gazeto. Ĉu ni ne vivas tro lukse? Ni laboru pli ekonomie kaj pli saĝe: kunlaboro garantias al ni pli grandan, pli imponan gazeton kaj ŝparon de kelkcentoj da guldenoj.

Mi konscias ke venos kontraŭstaro, sed tion ni ne timu.

Forlasante la estraron mi volas substreki ĉi tiun principan inte-

reson por la estonto: en nia movado katolika estas tro da konservativaj elementoj.

Pro tio mi intencas prezenti al la jarkunveno deziresprimojn pri ĉi tiu grava temo, nome pli da kunlaboro kun aliaj esperanto-organizoj."

Sekvis lia raporto pri la aferoj unuiĝaj (paĝ. 21—23).

K. J. VERNOOY

(Daŭrigota)

### OPROEP

Mede dank zij de financiële steun van de in het N.C.K.E. samenwerkende organisaties kon destijds „La kontakto”, officieel orgaan van NoSoBE (Nederlandse vereniging van blinde esperantisten) in braille-schrift worden uitgegeven. Om deze uitgave echter **blijvend** mogelijk te maken is veel geld nodig, meer dan de kas van NoSoBE voor dat doel beschikbaar kan stellen.

Gaarne wekken wij dan ook de Nederlandse esperantisten op wederom een bijdrage te storten voor dit sympathieke doel. Gireert nog heden uw gift op naam van de heer H. Delver, penningmeester van NoSoBE, postrekening 194703 te Bussum.

Bedenkt, dat vele kleintjes één grote maken.

A. F. LEIDERITZ,  
secretaris N.C.K.E.

Ondergetekenden, vertegenwoordigers van Nederlanda Katoliko in het N.C.K.E., betuigen gaarne hun instemming met bovenstaande oproep.

L. G. C. DE JONG  
H. F. ROOBEEK

## Rondvojago <sup>^</sup>tra <sup>^</sup>Ĉeĥoslovakujo

### III.

Ni vizitis la malnovan urbeton Liptovy Svaty Mikulas kaj de tie faris ekskurson al la fenomenaj grotoj stalaktitaj de Demanove, kiuj havas profundecon de pli ol 900 metroj kaj en kiuj la vizitantoj povas malsupreniĝi laŭ ofte tre krutaj,

serpentumantaj vojetoj, trans mallarĝajn pontetojn super profundaj abismoj, ĝis pli ol 60 metra profundeco. Pli malsupre oni ankoraŭ ĉiam esploras, preparas novajn alirejojn por la publiko por fari la vizitadon ĉiam pli interesa. Ĉi tiuj grotoj, en kiuj estas salonoj kun plej fantasia meblaro, formita el dum jarmiloj gutanta stalaktito, riveretoj kaj lagoj kiuj ŝajne havas profundecon duonmetran, sed en realeco kelkdekmetran, kies akvo estas tiel purega, ke oni povas klare vidi kiom da tempo bezonas monero por atingi la fundon, estas vere tre vidindaj. Fortaj lampoj lumigas la plej interesajn lokojn kaj estas mirinde, kiel diverskoloraj estas la diversaj specoj de stalaktito. Ĉeĥoslovakujo posedas tre multe da tiuj grotoj, pri kiuj oni povus verki tutan libron. Sed nia intenco estas, donu nur ĝeneralan impreson pri lando, kiu estas treege vidinda kaj kiu estas ideala libertempa restadejo, vi jam nun povos fari viajn planojn por la tempo, kiam estos forigitaj la baroj kiuj nun tiel malhelpas la liberan vojaĝon en Eŭropo: vizumoj, valuto (devizoj) ktp. En la pentrindaj vilaĝoj centoj da anseroj libere promenas tra la stratoj; ĉi tiuj bestoj estas grandamase bredataj ĉi tie pro sia granda utilo: la plumojn oni uzas por plenigi la lanugajn, kiel matracoj dikajn litkovrilojn, kiujn oni ĉie uzas kiel ĉe ni la lanajn. Ankaŭ la graso estas multvalora, same kiel la viando, kiam la besto atingis la plej favoran aĝon por esti mortigata. Virino kun unu aŭ du ofte brue protestantaj anseroj en sako aŭ korbo, kiu nur al la kapoj de la bestoj permesas montri sin tra truo, estas tre kutima vidaĵo, precipe en la vagonaro: kiam oni faras viziton al parencoj estas bona kutimo, ne alveni kun malplenaj manoj, ĉu?

Kiam vesperiĝas, oni povas vidi je la rando de la vilaĝoj kaj urbetoj strangan procesion: du aŭ tri bovgardistoj pelas la bestaron de la tuta komunumo hejmen, ofte 100—150 brunblankajn bovinojn, inter kiuj nombro da kaprinoj fiere kaj memkonscie marŝas flanke de siaj grandaj fratinoj. Je la fino venas gardisto kun sia hundo, kiu lasta de temp' al tempo kuras laŭlonge de la procesio por envicigi la kelkfoje petolantajn pilgrimantojn. Preskaŭ ĉiuj bovinoj portas sonorilojn, tiel ke la ceremonio eĉ estas akompanata per muziko. Je la komenco de la vilaĝo la procesio estas disigata: proprainciative la bovinoj kaj kaprinoj disiĝas en diversajn direktojn por atingi sian stalon. En tiu lando la paŝtejoj ne estas ĉirkaŭitaj per

fosoj kiel ĉe ni, tial la bestoj devas esti gardataj dumtage kaj restas en la stalo dumnokte.

En la kamparo oni ofte vidas strangajn, tre mallargajn kaj longajn ĉarojn, tre simplajn kaj el kruda ligno; sur la altaj randoj oni metas laŭlarĝe kelkajn tabulojn por servi kiel sidlokoj. La ĉaroj estas uzataj por la transportado de fojno kaj agrikulturaj produktoj, sed ankaŭ servas kiel veturilo por fari ekskursojn, viziti la preĝejon kaj eĉ por entombigaj transportoj. Ili estas tirataj per bovinoj — virbovoj estas tro multekostaj kaj tiujn nur la pli riĉaj kamparanoj posedas; la bovino samtempe estas laktofabrikantino kaj laboristino sur la kampo. — Iun dimanĉon mi renkontis tian ĉaron: sur la antaŭa benketo sidis du viroj, solene nigre vestitaj; sur la sekvanta tabulo du virinoj en ceremoniaj vestoj riĉe ornamitaj per brodaĵoj; post ili denove du virinoj, el kiuj unu tenis sur sia sino zorge envolvitan infaneton, kovritan per multkolore brodita kaj puntaĵornamita tuko: oni kondukis ĝin al la preĝejo por esti baptata.

(Daŭrigota)

TRUIS DURENKAMP

### Examencommissie Jaarverslag 1948

Algemene Nederlandse Esperanto Examen Commissie bestaande uit twaalf leden, namelijk uit F. L. E. de heren G. J. Degenkamp, W. F. Kruit en W. Prent; uit L.E.E.N. de heren F. Weeke, Mr A. J. Kalma en mej. H. M. Mulder; uit N.K. de heren P. Heilker, L. G. C. de Jong en Frater Wigbertus van Zon en uit N.C.E.V. de heren H. A. de Hoog, R. van Spronsen en J. L. Hut.

Voorzitter was de heer P. Heilker; secretaresse-penningmeesteres mej. H. M. Mulder. Gedelegeerde van de Minister van Onderwijs, Kunsten en Wetenschappen de heer J. van Andel, inspecteur Gymnasia.

Examinatoren waren alle commissieleden en enkele dames en heren uit de samenwerkende verenigingen. Vier examens vonden plaats, namelijk: 6 Mei Amsterdam en Leeuwarden, 29 Mei Den Haag (inplaats van Eindhoven, waarvoor zich niet voldoende kandidaten aanmeldden) en 6 November Utrecht.

Statistiek betreffende het aantal kandidaten:

	aangenomen		opgekomen		geslaagd	
	A	B	A	B	A	B
Amsterdam . . . . .	65	4	59	4	37	1
Leeuwarden . . . . .	34	1	30	1	24	1
Den Haag . . . . .	39	8	39	7	30	3
Utrecht . . . . .	68	18	65	17	46	10
Totaal . . . . .	206	31	193	29	137	15
Overzicht aantal geslaagden:						
F. L. E. . . . .				64		7
L. E. E. N. . . . .				34		3
N. K. . . . .				12		2
N. C. E. V. . . . .				3		1
Niet georganiseerd . . . . .				24		2
Totaal . . . . .				137		15

**KASSTAAT — JAAROVERZICHT**

Nadelig saldo 1947 . . . . .		f 44.05
Bijdragen vier organisaties . . . . .	f 60.—	
Onkosten jaarvergadering . . . . .		60.30
Saldo examen:		
Leeuwarden . . . . .	78.20	
Amsterdam . . . . .	121.86	
Den Haag . . . . .	85.99	
Utrecht . . . . .	146.72	
Administratie-onkosten . . . . .		105.74
Drukwerk . . . . .		171.30
Saldo 1948 . . . . .		111.38
	f 492.77	f 492.77

De secretaresse-penningmeesteres:

H. M. MULDER

*Het bondssecretariaat is thans gevestigd bij  
de Heer M. T. Aerds, Geraniumstraat 7, Eindhoven*

## Nederlanda Centra Komitato Esperantista

In de op 25 Maart j.l. plaats gehad hebbende jaarvergadering van het N.C.K.E. werd voor 1949 de heer H. A. de Hoog tot voorzitter benoemd. Tot vice-voorzitters: de heren P. Baas, A. van Haren en L. de Jong. De heer A. F. Leideritz Jr. werd tot algemeen secretaris-penningmeester herkozen.

Het jaarverslag-1948 werd onveranderd goedgekeurd.

Het financiële overzicht sloot per 31 December 1948 met een voordelig saldo. De contributie voor 1949 werd vastgesteld op 3 cent per lid per jaar.

In de komende werkperiode zal men voor bepaalde actiepunten streven naar concentratie van krachten op een zo breed mogelijke basis.

A. F. L.

## Magia triangulo

1	2	3	4	5	6	7	
2							
3							
4							
5							
6							
7							

Horizontale kaj vertikale:

1. pentraĵo
2. prijuĝi
3. punilo
4. klasikepoka urbo
5. formo de liturgio
6. komenco
7. persona pronomo

Ensendis: F. WINKEL

## Verslag Esperanto-cursus 1948-1949

Voor de propaganda van onze cursus hebben wij in het begin van het lopende seizoen slechts in enige dagbladen kleine advertenties geplaatst. Het leek ons niet verantwoord — gezien het geringe aantal aanvragen, die in de vorige seizoenen hierop ingekomen zijn — een groter risico te dragen.

Daar onze cursus nu eenmaal niet verspreid kan worden zonder daarvoor propaganda te maken, zijn vijfhonderd kaarten aangemaakt met de tekst: „Katholieken leert Esperanto”. Deze kaarten zijn bestemd om te worden geplaatst in parochiehuizen of verenigingslokalen. Daarnaast zijn vijfduizend sluitzegels gedrukt met dezelfde tekst als de genoemde propagandakaarten.

Jammer genoeg is in ons bondsblad — op het daarvoor gunstigste tijdstip September—November — bijna geen aansporing opgenomen om onze leden zelf de cursus te laten propagieren.

Te betreuren is het, dat zelfs die afdelingen, welke zelf een cursus organiseren, geen gebruik maken van de Nederlanda Katoliko-cursus.

Aan de aanvragers van de propagandakaarten en sluitzegels werd tevens een kaart gezonden, welke bij hen thuis voor het raam dient geplaatst te worden.

Een gunstig resultaat is geweest, dat de redactie van „De Kajotter”, het maandblad van de katholieke arbeidersjeugd, op aansporing van hun leden, ons verzocht om artikelen over Esperanto. Wij hebben natuurlijk van de gelegenheid gebruik gemaakt om in „De Kajotter” propaganda te maken voor onze cursus. Hierop zijn diverse aanvragen om proeflessen ingekomen.

Ons plan om telefoon-naamlijsten te laten drukken, kon tot nu toe niet verwezenlijkt worden. Het vereiste aantal bestellingen is tot op heden nog niet binnengekomen. Van de vijfhonderd bestellingen die nodig zijn, zijn nu plus minus honderdvijftig aanvragen binnen. Willen de leden er voor zorgen, dat dit aantal spoedig vol is? Het zetsel staat al maanden drukklaar. De propaganda door middel van deze naamlijsten heeft blijvende waarde, omdat het werkelijk geen uitzondering is, dat 'n telefoon-naamlijst drie tot vijf jaar naast het toestel hangt. Het aantal aanvragen voor een proefles is dit jaar uiterst klein.

We hebben tot 1 April slechts een kleine tachtig aanvragen ontvangen. Het aantal cursisten bedroeg op die datum slechts zeven en twintig. Een drietal cursussen zijn door de afdeling Eindhoven besteld.

Van de affiches welke wij hebben laten aanmaken ter aankondiging van een propaganda-avond heeft, in dit seizoen, alleen de afdeling Eindhoven gebruik gemaakt. De afdeling Amsterdam heeft een voorbeeld gegeven — al was het wat laat in het seizoen — door een vijftigtal propaganda-kaarten te bestellen met de benodigde sluitzegels.

Via de radio is dit jaar geen propaganda gemaakt.

Nogmaals dringen wij er op aan, dat de afdelingen voor het volgende seizoen gebruik maken van de Nederlanda Katolico-cursus. De leden verzoeken wij dringend, dat ook zij de Nederlanda Katolico-cursus niet vergeten en vooral om bij hun propaganda voor Esperanto te wijzen op onze eigen cursus.

De administrateur van de  
Nederlanda Katolico-cursus:  
A. W. WITHOOS

## Ĉu vi preparas vin por ekzameno a?

### Tiam ni rekomendas:

Esperanto Krestomatio, kart. . . . .	f 1.75
Examen-opgaven A en B (met vertalingen) . . . .	„ 1.25
Kalma: Examen doen (met opgaven) . . . . .	„ 1.00
Wat de A-candidaat van de geschiedenis van Esperanto weten moet . . . . .	„ 0.30
Zamenhof: Fundamento de Esperanto . . . . .	„ 0.75
Schidlof's zakwoordenboek . . . . .	„ 2.25
Degenkamp: De voorzetsels, kart. . . . .	„ 1.50

Mendu ĉe la libro-servo de  
„NEDERLANDA KATOLIKO”  
Kasperspad 91 — Dordrecht

